

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



**Naila Sadretdinova**  
[Voroneĵ, Rusio]

2002

Kiel Andre Cherpillod, akademiano, premiito de Fondajo de A. Grabowski, aŭtoro de multaj E-libroj iĝis komencanto — literatur-historiaj paĝoj — kristnaske kaj novjare — por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lernantoj — neelpensitaj historioj — tempo kaj homoj aforismoj — anekdotoj — invitoj kaj informoj — korespondu!

6

## Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorská 1, CZ-696 62 Strážnice

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

**Finnlando** Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

**Francio** ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## redakcie

Karaj legantoj!

Senĉese "rotacias karuselo" de vivo kaj denove venis tempo kalkuli rezultojn de nia dumjara kunlaborado en la komuna kampo. Ni povas konstati, ke "Komencanto" sufiĉe evoluis. Kiel ni planis fine de 2001, nia revuo en 2002 plidikiĝis ĝis 16 paĝoj, ĝia kovrilo iĝis kolora kaj la enhavo pli varia.

Krom la tradiciaj rubrikoj, kiuj delonge gajnis la simpatiecon de la legantoj, aperis tute novaj: "Neelpensitaj historioj", "Amuza gramatiko", "Tempo kaj homoj", "Invitoj kaj informoj".

Laŭ niaj kalkuloj dum 2002 por "K" kontribuis per diversĝenraj verkoj 64 komencantaj aŭtoroj el Brazilo, Britio, Francio, Germanio, Italio, Kazahio, Koreio, Kubo, Nederlando, Rusio, Svedio, Usono, Uzbekio. Por nia revuo pentris 21 amatoraj pentristoj.

En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" pri sia esperantistigo rakontis famaj esperantistoj el 5 landoj. En la literaturhistoria rubriko ni prezentis la vivon kaj literaturan agadon de 9 konataj verkistoj de la dua periodo de Esperanto-literaturo.

Malgraŭ tiuj imponaj ciferoj ni rimarkis, ke ankoraŭ multaj el niaj legantoj ne kuraĝas aliĝi al la krea kunlaborado. Ni alvokas ĉiujn kontribui por "K" dum la venonta 2003-a jaro — spaco de nia periodaĵo estas por via dispono! Ni volonte akceptos ĉiujn interesajn ideojn kaj iniciatojn!

Ni deziras al vi, karaj legantoj, feliĉan Novan jaron, bonan sanon kaj sukcesplenan vivon!

## KOMENCANTO

2002 numero 6 // (38) // 6 numeroj jare regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2003:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".


La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

# Kiel tio komenciĝis

André Cherpillod

Membro de la Akademio de Esperanto, Premiito de la Fondaĵo A. Grabowski "Dico d'or" 1988, "Granda Ĉampiono" de la Diktaĵo de l' Amerikoj 1999, aŭtoro de Etimologia Vortaro de Esperanto kaj pluraj libroj en la internacia lingvo.

**En 1944, mi elkovris la ekziston de la lingvo;  
en 1955, mi elkovris la uzadon de la lingvo.**



**A**ntaŭ la Dua Mondmilito, mi kaj miaj gepatroj vivis tute proksime de Parizo. Sed mia patrino memoris la germanajn bombojn, kiuj faladis sur la francan ĉefurbon dum la Unua Mondmilito. Tial, pli timema ol kuraĝa, ŝi decidis, ekde septembro 1939, ke ni devas forfuĝi la ĉefurbon kaj instaligi je 200 km okcidente de Parizo, en Normandia vilaĝo. Ŝi estis naive konvinkita, ke neniu germana soldato iam alvenu en tiun lokon, tiel malproksime de Germanio. Evidente, ŝi elreviĝis en Junio 1940...

Mia patro estis jam maljuna, kaj mia patrino devis pergajni nian vivon purigante la domojn de kelkaj burĝoj de la vilaĝo. Interalie, la domon de la notario. Kelkfoje mi akompanis kaj helpetis ŝin. Iam, en akcesora ĉambro, speco de formetejo ne ofte vizitata, mi vidis tutan kolekton de malnovaj libroj, bluetaj, pli-malpli polvaj: francaj klasikaj eldonitaj ĉirkaŭ la jaroj 1880 (verkoj de Racine, Corneille, Molière, Voltaire, kaj aliaj).

"Ho, panjo, ĉu mi rajtas deprunti kelkajn kaj kunporti ilin hejmen?"

— Tute ne, krom se s-ro notario permesos tion!"

S-ro notario, demandita, ne hezitis: "La polvoplenaj libretoj de la formetejo? Ili ne utilas al mi. Ci kunportu kaj konservu la tuton! Ne dankinde. Tio igos la spacon liberala!"

Mi kunportis kaj konservis la tuton. Mi ilin ankoraŭ havas.

Inter tiuj bluetaj libroj, unu estis aliaspekta: ruĝa, iom pli granda. Titolo: "L'Espèranto en dix lecons" (Espèranto en dek lecionoj), de Th. Cart kaj M. Pagnier. Ĝi datumis de 1909.

"Espèranto, mi pensis, mi konas tiun nomon! Mia patro jam citis ĝin: temas pri lingvo tute artefarita, kiu bedaŭrinde ne disvastiĝis".

Lingvo artefarita!.. Tio tiklis mian cerbon. Kiel lingvo povas esti artefarita? Tiam, mi jam komencis la studadon de la latina kaj de la germana. Sed lingvo artefarita! kiun aspekton ĝi havas? al kio ĝi similas?

Mi komencis foliumi la libron.

La nutraj problemoj de la milittempo kaŭzis, ke ĉiutage mi devis laŭiri la vojrandojn, por pluki ian kvanton da herbo, cele al la nutrado de nia deko da kunikloj. Per unu mano mi plukis herbon, per la alia mano mi tenis la etan ruĝan libreton. Kaj mi legis, legis. Mi legis ĝis la fino de la deka leciono. Mi malkovris la simplan meĥanisman de la lingvo. Mi parkerigis kelkajn poeziojn: *La Espero*, *La Kapeleto*, *En Sonĝo*. Mi ankoraŭ scias ilin.

Tio okazis dum la somero 1944, post la albordiĝo en Normandion far la aliancaj trupoj: mi estis dekkvarjara knabo.

Mi ellernis la libron nur pro la deziro ekscii. Efektive, mi estis la sola persono en la tuta mondo, kiu iom sciis Esperan-

ton. Almenaŭ tion mi povis kredi. Tial, post la finlegado, mi metis la libreton en ian ŝrankon, plibonigis mian kulturon per la legado de diversaj ĉefverkoj de la klasika franca literaturo kaj tute forgesis Esperanton, tiun lingvon ja inteasan, sed perfekte senutilan.

Dek unu jaroj pasis. Iam, en 1955, mi gapvadis en granda pariza vendejo, *la Magazeno de l' Urbodomo*. Hazarde, miaj okuloj renkontis verdetan broŝuron "*L'Espèranto, cet inconnu*" (Espèranto, tiu nekonato), de A. Ribot. La broŝuro ne estis kurso, sed prezentis la problemon de la interkompreniĝo kaj ĝian solvon per Esperanto. Abundis la detaloj pri la utileco de la lingvo, pri ĝia literatura valoro, ktp. Konvinkita mi jam estis, de post la somero 1944.

Male de la ruĝa libreto, tiu broŝuro donis adresojn: UEA., SAT., la Esperantista Centra Librejo (nuntempe formortinta), kaj aliajn. Do mi ne estis la sola esperantisto en la mondo! Asocioj ja ekzistas! Esperanton oni efektive parolas! En 1944, mi elkovris la ekziston de la lingvo; en 1955, mi elkovris la uzadon de la lingvo.

Mi enskribiĝis en perkoresponda kurso, rapide retrovis la nivelon de la somero 1944, vizitadis la superan kurson de Jean Thierry (la aŭtoro de la *Assimil-lernolibro*), abonis gazetojn, ĉeestis kunvenojn, kongresojn.

Alivorte, mi iĝis komencanto. Eĉ poste, mi iĝis ne-plukomencanto.

Nun mi estas aŭtoro de preskaŭ-trideko da libroj en la internacia lingvo. Mi ĵus finis la verkadon de 520-paĝa Etimologia Vortaro de Esperanto. Oni eĉ metis min, vole-nevole, en la Akademion...

# La dua periodo de esperanta literaturo

Karaj legantoj!

Sur la paĝoj de nia literatur-historia rubriko ni volas prezenti al vi unu el la plej elstaraj nomoj de esperanta proza literaturo.

**Stellan Engholm** — sveda instruisto-lingvisto, eminenta verkisto de originalaj E-romanoj kaj noveloj, brila tradukanto de svedaj verkoj, bonega eseisto. Li verkis ankaŭ svede.

S. Engholm naskiĝis en 1899 en Stockholm. Li konatiĝis kun Esperanto en 1920, sed iĝis aktiva esperantisto nur en 1927 kaj restis fidela al Esperanto ĝis la morto.

Sian literaturan karieron li komencis kiel unuaranga tradukisto (proza kaj poezia). S. Engholm tradukis multajn romanojn de svedaj verkistoj: "La mono de sinjoro Ame" de Lagerlöf (1933), "Gösta Berling" de Lagerlöf (1934), "Pasko" de Strinberg (1935), "La ringo de la generalo" de Lagerlöf (1938), "La fino" de F. Bernadotte (1946). Kune kun Paul Nylén li tradukis "Per balono al la poluso" (1930), kiu estis verkita laŭ la taglibro de la tragedia sveda ekspedicio en 1897, kiun gvidis inĝeniero S. A. Andrée. Estas konata ankaŭ la traduko de "Ekspedicio Kon-Tiki" de fama norvega verkisto kaj mondvojaĝanto Thor Hejerdahl, farita de Engholm kune kun Garsten Brunildsen.

Prozajn tradukojn de S. Engholm karakterizas klara, flua stilo kaj senproĉa lingvo. Sed li pruviĝis ankaŭ talenta verstradukisto en siaj poezi-tradukadoj, aperintaj en la revuo "Literatura mondo". En la "Sveda Antologio" (1934) aperis liaj bonegaj tradukoj de poemoj.

Kiel verkisto de la originalaj romanoj S. Engholm debutis en 1930 per romano "Al Toronto" kaj tuj akiris popularecon. Poste aperis ankoraŭ du romanoj "Infanoj en Toronto" (1934) kaj "Vivo vokas" (1946), kiuj kun la unua konsistigis la "Toronto" — trilogion, represitan en 1972. Klara proza verkista talento de Engholm rapide disvolviĝis: lia dua romano "Homoj sur la tero" (1932) gajnis la premion de la romankonkurso de "Literatura Mondo". La temo de ĉi-tiu libro estas la vivo de simplaj homoj — bienuloj. Kun kapablo de psikologia observemo kaj preciza kono la aŭtoro priskribas diversvoĵajn sortojn de homoj, kiujn kunkroĉas la ĉefheroo: la Tero.

Kiel instruisto Engholm havis vastan kontakton kun infanoj kaj homoj "sur la tero" kaj povis pri tiuj paroli kun varma simpatio tiel, ke intereso de legantoj restas streĉita ĝisfine, malgraŭ la malriĉon de okazadoj en la romano. Ankaŭ du liaj noveloj "Maljunulo migras" kaj "Venĝo" (1934) estas majstropecoj.

S. Engholm montris sin escepte kapabla ankaŭ kiel redaktoro. Granda lia merito estis fondo de la periodaĵo "Malgranda revuo", kiu malgraŭ la modesta aspekto, estis unu el la plej enhavoriĉaj, seriozaj revuoj en la jaroj 1943-1952. Engholm mem multe verkis por sia revuo en karaktera por li trankvila, harmonioserĉa maniero kaj donis lokon ankaŭ por novaj talentoj. Tiu revuo, aperinta meze de la milito, estis pruvo ne nur pri neŝanceblebla fido de la redaktoro, sed ankaŭ pri neestingeblo vivipovo de Esperanto.

Stellan Engholm estis grava reprezentanto de realismo en esperanta-literaturo, sed samtempe li estis plena de sobra humanismo kaj idealismo. Tial lia entuziasmo por ĉio nobla kaj lia sobra, iom seka klarvido miksiĝis en li je originala, tre simpatia alojo kaj certe influis lian tutan literaturan kreadon.

Karaj legantoj! Por konatigi vin kun la originaleco de literaturo stilo de Stellan Engholm ni prezentas ĉi-tie kelkajn fragmentojn el liaj diversaj verkoj.

Kononova Sneĵana [N. Omka, Rusio]



Selma Lagerlöf Gösta Berling  
Traduko de *Stellan Engholm* (fragmento)

## La balo en Ekeby

Ho, virinoj de tempoj pasintaj!

Paroli pri vi estas kiel paroli pri la regno ĉiela; nur belo vi estis, nur lumo. Eterne junaj, eterne belaj vi estis kaj mildaj kiel okuloj de patrino, kiam ŝi rigardas sian infanon. Molaj kiel sciuridoj vi pendis ĉirkaŭ la kolo de la viro. Neniam via voĉo tremis pro kolero, neniam sulkiĝis via frunto, via mola mano neniam fariĝis kruda kaj malmola. Dolĉaj sanktulinoj, kiel ornamitaj statuoj vi staris en la templo de la hejmo. Incensojn kaj preĝojn oni oferis al vi, pere de vi la amo plenumis siajn miraklojn, kaj sur vian verton la poezio metis orbrilan aŭreolon.

Ho, virinoj de tempoj pasintaj, jen estas rakonto, kiel ankoraŭ unu el vi donis sian amon al Gösta Berling.

Du semajnojn post la balo en Borg estis festo en Ekeby.

Kia festo tiam estis! Maljunaj viroj kaj virinoj kvazaŭ rejuniĝis, ridetis kaj ĝojis, kiam ili nur parolis pri ĝi.

... Kiom da ĝuo ampleksis tiuj dolĉaj dekdu horoj, ekde la klako de la unua vinbotelo ĉe la tagmanga tablo ĝis la lasta arĉmovo, kiam la noktomezo jam antaŭ longe pasis! Ili malaperis en la abismo de la tempo, tiuj florumitaj horoj, sorĉitaj de plej fajna vino, de plej franda mangajo, de plej bela muziko, de plej spritaj teatraĵoj, de plej okulravaj scenbildoj. Ili malaperis, ebriaj de plej ebriiga danco. Kie ekzistis tiom glataj plankoj, tiom ĝentilaj kavaliroj, tiom belaj virinoj.

**Stellan Engholm**  
Eseo (fragmentoj)

## Esperanto kaj lingva sento

En n-ro 3-4, 1945 de "Esperanto Internacia" troviĝas artikolo titolita "Lingva Sento". La verkinto, Ismael Gomes Braga, rakontas, ke li en sia nacia lingvo legis libron de verkisto, kiu naskiĝis en la alia lando sed longe vivis en Brazilo kaj scias la landan lingvon. La lingvo en la libro estis korekta, tamen ĝi iel ne plaĉis. Sinjoro Braga ne povis kompreni kial. Filologo donis respondon: la verkinto "scias" la lingvon, sed li ne sentas ĝin, ĝi estas por li fremda lingvo.

"Tia lingva sento estas io sankta, neklarigebla, kio apartigas la homojn per nedifinebla antipatio."

Sed ĉu vere estas eble akiri tian senton por esperanto, kian ni havas por nia gepatra lingvo? Mi pretendas, ke nepre jes. Kiel oni akiru ĝin? Same kiel ni akiras la senton por la gepatra lingvo, escepte la unuaŝtupan lernadon de malgranda infano. Nur malofte iu komencas lerni esperanton per imitado de vortoj kaj interparolo. Krome logiko kaj persona lingvokreado ludas en esperanto pli grandan rolon ol en naciaj lingvoj. Sed certe estas la sama afero.

Tro ofte oni lernas esperanton - mi pensas ne nur pri la komenco - same kiel nacian fremdan lingvon. Oni mekanike lernas vortojn, gramatikajn aferojn, esprimojn. Poste oni skribante kaj parolante same mekanike uzas la lernitajn aferojn kaj kredas, ke ĉio estas korekta. Necesas do kritiki malplitrafan skribadon kaj diradon, por lerni forstreki ĉion, kio ne estas necesa. Tiel ni akiras lingvosenton. Poste ni povas, se ni tion deziras, iom post iom transiri al pli komplikita stilo. Uzante tian ni tamen devas esti same zorgaj kiel antaŭe aŭ ankoraŭ pli.

Ni havas kaj havos multegajn gradojn de lingvosento kaj lingvosento; sed la lingvo estas komuna posedaĵo de ni ĉiuj, kaj komuna estas ankaŭ la lingvosento, ĉu granda aŭ malgranda, kaj tiel eĉ balbutanta komencanto ne estas al iu alia eksterulo aŭ naciano.

**Stellan Engholm**

(fragmento el premiita romano)

## Homoj sur la tero

... Kiam la filo de Selma estis naskiĝinta kaj ricevinta la unuan flegon, Kajsa eliris al la provizejo kaj alportis la malnovan lulilon en la kuirejon. Tie ŝi forlavis de ĝi la malpurajon kaj polvon, tiel ke la ruĝaj rozoj brilis same rosfreŝe junaj kontraŭ la blua fono kiel iam antaŭ tridek jaroj. La postajn tagojn ŝi pretigis tolaĵon por la lulilo, kaj kiam Selma definitive forlasis la liton, ĉio estis preta. Tiam ŝi prenis la etulon, metis lin en la lulilon kaj mem eksidis apude por zorgi pri lia bonfarto.

Nek Kristoforo nek Selma atendis tion de ŝi. Kiu konis Kajsan, laborintan kiel viro sur kampoj kaj herbejoj kaj tiom fiksitan al la korto, ke ŝi ne havis pensojn eĉ por sia propra filo, tiu apenaŭ povis imagi, ke ŝi subite ekhavas intereson por infaneto. Sed Selma ĝojis pro tio. La kortuŝe fidela prizorgo de la maljunulino varmigis ŝian internon, kiel iel ŝajnis al ŝi, ke Novponto komencis ŝanĝi karakteron.

Post sia resaniĝo Kajsa sentrankvile kuradis tien kaj reen tra la tuta korto kaj ĉie ektrovis farendajn laboretojn, por kiuj neniu alia havis tempon. Selma faris ĉiujn pezajn laborojn, kaj Kajsa estus povinta havi bonajn tagojn, sed tion ŝi ne ŝatis. Ŝajne kaptis ŝin la maljunaga timo, ke ĉio ne estos orde prizorgata kaj ne iros bone, se ne ŝi mem superrigardos ĉion.

Tiom pli frape estis, kiam ŝi nun tute subite transdonis ĉion al la sorto kaj eĉ ne ŝajnis havi penson pri ĝi. La lignoprovizejo, la bovinejo, la kelo kaj la provizejo kaj la cent aliaj aferoj, kiuj tage kaj nokte okupis ŝiajn pensojn, kvazaŭ mirakle malaperis el ŝia konscio, kaj ŝi vidis nur la senfortan etulon en la lulilo.

Ĉu li dormis aŭ ne, ŝi same fidele restis. Kiam li ne dormis, ŝi paroletis kun li, kvazaŭ ŝi mem denove estus infano. Kiam li estis dormonta, ŝi lule dormigis lin, sed tre gardeme, kvazaŭ ŝi timus lin timigi. Revekigis malnovaj lulkantoj, kiuj dum pli ol tridek jaroj dormis en la anguloj de ŝia memoro, kaj ŝia sensora, maljunulina voĉo kortuŝe ĉirpadis ilin, dum la lulilo moviĝis kaj la trikiloj senĉese zigzagis inter ŝiaj ostaj kaj ŝrumpintaj fingroj.

Komence oni kredis, ke bovinejo, kelo kaj ĉio alia baldaŭ rekaptos ŝian intereson. Sed tio ne okazis. Ŝi fidele restis sur sia elektita posteno, kaj ĉio alia, eĉ la plej proksimaj okupoj kaj objektoj, tiom komplete malaperis el ŝia konscio, ke ŝi ŝajnis tute nescianta pri ili.

Kiam Selma venis por nutri la knabon, ŝi sidis

en trankvila meditado. Ŝia rigardo, nun amikeca kaj mola kiel ĉe infano, senĉese vagadis inter la vizaĝo de Selma kaj la etulo ĉe ŝia brusto.

Ŝi diris preskaŭ nenion, sed Selma bezonis nur vidi ŝian vizaĝon por kompreni ŝian bonvolon. Ŝi tute ŝanĝiĝis post la alveno de tiu infano. La sentoj de bono kaj amo, kiuj dum tuta ŝia vivo estis kaŝitaj en ŝia interno, kaj pri kiuj ŝi mem eble ne konsciis antaŭe, subite ekfloris kiel bela ĝardeno meze de la malriĉa aŭtuno de la vivo.

Kaj tiel silenta amikeco kunligis la du virinojn, pli forte ol povus la plej belaj vortoj kaj agoj...



**Santi Elena Bullo**  
[Mestre, Italio]



Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

## Gajan Kristnaskon kaj feliĉan Novan jaron!

La spacon de ĉi-tiuj du paĝoj ni certe disponigas por vintraj kaj prifestaj verkoj de niaj legantoj.

Opletajev Vladimir [Surgut, Rusio]

## Neĝas sur la teron

Tre alte super la tero, kie ĉiam estas malvarme, akvaj vaporeroj glaciĝas. Ili estas malgrandaj kiel apenaŭ videblaj kristaloj-polveretoj. Se ekstere estas ne tro froste, la glacieroj trafinte nubon havigas al si pingletojn, ĉiam pli kaj pli grandiĝas kaj finfine fariĝas neĝeroj. Ili similas al blankaj steletoj. La stelforma strukturo estas aparte bone videbla en la glacia kaverno apud la urala urbo Kungur, kie sur la ŝtonaj muroj pro la humida aero kreskas neĝeroj grandaj je la manplato.

La neĝeroj tre varias laŭ sia formo. Entute oni kalkulas 246 diversajn formojn de la neĝeroj. En unu neĝofalo povas aperi de 8 ĝis 40 malsimilaj specoj. Kiel bazon ĉiuj neĝeroj havas aŭ sesangulan platon aŭ sesedran prismon. La plataj neĝaj kristaloj ofte aspektas kiel steletoj kun 3, 6 aŭ 12 radioj, kaj la prismaj kristaloj havas formon de globoj aŭ erinacoj. Ilia diametro atingas kutime kelkajn milimetrojn. Ĉe la temperaturoj de 0 ĝis -4°C dominas platetoj; de -4 ĝis -10°C — prismoj, spiraloj kaj pingloj; de -10 ĝis -20°C — dikaj, plej ofte sesangulaj platetoj kaj kristaloj similaj al densaj arbokronoj; de -20 ĝis -35°C — malplenaj fostetoj. Sed kiam la aera temperaturo proksimiĝas al 0°C la neĝeroj kunpuŝiĝante tre ofte grandiĝas je sufiĉe ampleksaj neĝoflokoj. Krom tio ekzistas en la naturo la glacia polvo — treege malgrandaj kristaletoj aperantaj ĉe fortaj frostoj kaj serena ĉielo. Kiam ili estas falantaj sur la teron povas en la aero aperi miraklaj vizioj — brilantaj vertikalaj fostoj kaj cirkloj, falsaj sunoj.

Homoj precipe ŝatas tiujn momentojn en la vintra sezono, kiam en la naturo ĉio silentiĝas, kaj sur la teron abunde falas grandaj lagunaj neĝoflokoj, kiuj kovras la tutan teron per blanka mola tapiŝo kaj kreas en la animo neripeteblan etoson de mirakla festo. Aparte bonvenaj kaj aspirataj montriĝas tiaj tagoj antaŭ la Kristnasko kaj la Nova jaro. Sed nemalpli bela estas la neĝa kovraĵo, kiam en la frosta tago miriadoj da glaciaj steletoj, kvazaŭ sennombraj speguleroj malavare ŝutitaj sur la teron, reflektas sunradiojn en la furioza luma danco surfone de la senlima lazura ĉielo.

La brilanta vivo de la neĝeroj daŭras ne longe. Ili tre rapide deĝelas cedante al la varmo de la printempaj sunradioj kaj akvagute saturas la teron, kiu nur iam post pluraj monatoj ankoraŭfoje spertos malvarman nordan venton faligantan sur ĝin novajn neĝerojn...

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

## Neĝas strate

Neĝas strate,  
Tre beate  
Montoj dormas.  
Blankas foro,  
Ĝojas koro —  
Vintro oras.

Frostaĵoj,  
Hundoj, domoj  
Ĝis la ostoj.  
Sur la tero  
Regas vera  
Avo Frosto.

Jen majesta  
Bela festo,  
Gloro caro  
Venas mute  
Sendispute  
Nova Jaro!



tradukis el la hispana  
**Yves Brusó**  
 [Douarnenes, Francio]

## Letero el koro

Frederiko A. laboris en la loka poŝtofiĉejo, kie oni nomis lin: "La komisiito por la leteroj sen ricevonto", ĉar li zorgis pri la leteroj, kies adresoj estis nesufiĉaj aŭ nelegeblaj. Li loĝis en la malnova domo kun sia edzino, filineto kaj fileto, kiu estis la plej juna. Post la vespermanĝo li ŝatis ekbruligi sian pipon kaj rakonti al la familio siajn lastajn prodaĵojn pri la distribuo de la perditaj leteroj. Li rigardis sin kiel detektivo kaj lia modesta horizonto estis sennuba.

Iun matenon lia knabeto ekmalsanis subite kaj du tagojn poste mortis.

Premegita peri sian afflikton, Frederiko sentis sin kvazaŭ antaŭmortinta. La edzino kaj la filino Mariana strebis regi la doloron, kiu trafis ilin, sed Frederiko ne trovis forton por kontraŭstari la malfeliĉon kaj lia vivo iĝis kiel letero sen adreso. Matene li leviĝis kaj iris al la laboro kiel somnambulo. Li parolis nur por respondi al ajna demando; li tagmanĝis sole. Dum vespermanĝo li sidis ĉe la tablo silenta kiel statuo kaj enlitiĝis tro frue. Lia edzino sciis, ke li tranoktadas kun la malfermitaj okuloj, rigardofiksita al la plafono. Multaj tagoj pasis, sed lia apatio nur pliprofondiĝis. La edzino diris al li, ke tia malespero estas maljusta ne tiom rilate la mortintan infanon, kiom kontraŭ ilin mem, kiuj vivis. Sed ŝiaj vortoj lin tute ne interesis.

Proksimiĝis la Festo de la Tri Reĝoj.\*

Iuvespere ĉe la malbela vetero

Frederiko sidis sur sia alta tabureto; antaŭ li estis nova stako da leteroj sub la balanciĝanta lampo. Sur la stako kuŝis unu el tiuj leteroj, kiu, evidente, estis nedistribuebla. Sur la koverto oni povis legi nur skribitajn per krajono vortojn: "La Tri Magoj en la ĉielo". Frederiko prepariĝis por forĵeti la leteron, kiam io retenis lin. Li malfermis la koverton kaj legis:


"Karaj Tri Reĝoj!

Ĉijare ni estas tre tristaj kaj mi ne volas, ke vi alportu ion ajn al mi. Mia eta fraĉjo pasint-printempe foriris al la ĉielo. Mi deziras nur tion: kiam vi venos en nian hejmon, kunprenu la ludilojn de mia frateto kaj transdonu ilin al li. Mi metos ilin en la kuirejo ĉe la forno - la ĉevalon, la trajnon kaj la ceteron. Mi scias, ke sen ili li sentas sin perdita en la ĉielo, precipe sen la ĉevalo, li tiel ŝatis "rajdi"; mi do petas vin - transdonu al li liajn ludilojn kaj ne maltrankviliĝu pri mi.

Se vi povus fari ion por la paĉjo, ke li fariĝu tia, kia li estis antaŭe: fumus sian pipon denove kaj rakontus al ni historiojn, - mi ŝatus, ke vi faru tion. Foje mi aŭdis, kiel li diris al panjo, ke sole la eterneco povus resanigi lin. Se vi povas alporti al li iom da tio, mi promesas al vi esti afabla kaj obeema knabineto. Faru tion, karaj Tri Magoj, kaj tion, kio plaĉos al Viaj Reĝaj Moŝtoj.

Mariana".

Tiun vesperon Frederiko revenis hejmen rapide. En la vintra mallumo li haltis en la ĝardeneto antaŭ la domo kaj ekbruligis sian pipon. Malfermante la pordon de la kuirejo li faris grandan elspiraĵon da fumo, kiu aspektis kiel nimbo ĉirkaŭ la kapoj de la edzino kaj filino, kiuj ne povis kaŝi sian miron. Frederiko ridetis al ili kiel antaŭe li kutimis fari.



Terjofina Maŝa [Uljanovsk, Rusio]

(\*) En Hispanio ne estas kristnaska paĉjo. Estas la Reĝoj, kiuj nokte, la sesan de januaro, alportas donacojn. (klarigo de la tradukinto)

**Leksina Ludmila**

[Sudja, Rusio]

**Besta alfabeto***Datŭrigo. Komenco**(A,B,C) en la numero 8-2001**Ĉ, D, E, F en 1-2002; G, Ĝ, H, I en 2-2002**K, L, M, N en 3-2002; O, P en 4-2002;**R, S, Ŝ, T en 5-2002;***U**

Unuiĝas urso, uro,  
 Uzurpinte unu urbon.  
 Uraganis urso, uro,  
 Utiligis urbajn urnojn.

**V**

Vagas varano, voras vipurojn.  
 Vulpo vostumas viglante.  
 Vanta vikuno vane vegetas,  
 Vake vulgare vivante.

**Z**

Zebroj, zebuoj, zibeloj  
 Zigzage zoon zonas.  
 Zorgeme zumas zizeloj.  
 Zenite zefiro zomas...

**Fino****Por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lernantoj****Vŝivceva Tatjana** [Miass, Rusio]**Gaja Gramatiko****14. Skribe, buŝe — same ĉiam**

Uzu vi literon ĉiun.

Lskribu "mola" kaj parolu,  
 Ankaŭ legu nepre "mola".  
 Se "perfekte", do perfekte  
 Skribu, legu ĝin efekte.

**15. Meti la akcenton hastu**

Sur silabon antaŭlastan.

Morgaŭ, ve, anstataŭ, male,  
 Vidi, ŝati, aktuale,  
 Preter, ĵus, antaŭa, festa,  
 Pilko, vintro, kant' majesta...

**16. Tiu regulo de la gramatiko estas Alfabeto.**

Krom tio

Ero de kalkul' banala  
 Ja nomiĝas numeralo.

Unu, du, tri, kvar kaj kvin  
 Ses, sep, ok, naŭ, dek en fin'.  
 Miliona, nula, centa —  
 Numeralo estas certe.

**Fino**

El la libro de Erik Orsenna "La gramatiko estas milda kanzono" esperantigis **Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio]  
 Parto unua. La finon legu en "KOMENCANTO-1-2003"

**La Urbo de la Vortoj**

Malsupre de ni etendiĝis urbo, vera urbo, kun stratoj, domoj, magazenoj, hotelo, urbodomo, preĝejo kun pinta sonoril-turo, arabstila palaco kun la turo, malsanulejo, fajro-brigadistejo... Urbo tute simila al la niaj. Krom tri diferencoj:

1. La grandeco. Ĉiuj konstruaĵoj estis duonigitaj kompare al la normalaj. Oni povintus pensi pri maketo, scenejo.
2. La silento. Kutime urboj tre bruas: aŭtomobiloj, motorbikloj, motoroj diversaj, akvo-peliloj en necesejoj, disputaĉoj, tretadoj de ŝuoj sur la trotuaroj... Tie — nenio. Nur tre mallaŭtaj susuradoj, ne percepteblaj ĉifonbruoj.
3. La loĝantoj. Neniu viro aŭ virino. Neniu infano. La stratoj estis iritaj nur de vortoj. Nekalkuleblaj vortoj, radiantaj sub la suno. Ili promenis, kvazaŭ hejme, ili etendis trankvile siajn silabojn en la aero, ili antaŭeniris, iuj severaj, klare konsciaj pri sia graveco, emaj al ordo, al rekta linio (konstitucio, karburilo). Aliaj multe pli fantaziaj, nekontrolleblaj, flugetis, ĝoje rajdadis, kapriolis kiel frenezaj ĉevaletoj, kiel ebriaj papilioj (plezuro, mamzono, olivoleo). Mi rigardis, mirigita, iliajn movojn. Mi neniam antaŭe atentis pri vortoj. Ne unu sekundon mi povintus imagi, ke ili havas, kiel ni, sian propran karakteron. La amiko, kiu estis kun ni, rakontis ilian historion:



Sadretidinova Naila [Voronej, Rusio]



"Iun tagon la vortoj ribelis. Ili ne plu eltenis la ĉeestadon en la buŝoj de la homoj. Mi certas ke vi neniam pensis pri la suferoj de la vortoj. Kie kuŝadas vortoj antaŭ ol esti elparolitaj? Pripensu unu sekundon. En la buŝo. Meze de putrintaj dentoj kaj malnovaj restaĵoj de bovidaĵo blokita inter ili; fi-odorigitaj de malbona haladzo, skrapvunditaj de mallertaj langoj, dronintaj en acida salivo. Ĉu vi mem akceptus vivi en buŝo? Pro tio, iun matenon, la vortoj eskapis. Ili serĉis ŝirmejon, landon en kiu ili povus vivi inter si, malproksime de la abomenaj buŝoj. Ili venis ĉi-tien. Nun vi scias ĉion."

... "Vi povas rigardi ilin laŭ volo, la vortoj ne faros malbonon al vi. Sed ne pripensu eniri al ili. Ili scipovas defendi sin. Ili povas piki pli ol vespoj kaj mordi pli ol serpentoj."

... "Kiam la vortoj estas liberaj okupi sian tempon laŭvole, anstataŭ servi nin, ili ĝoje vivas. Ili pasigas tagojn en alivestadoj, ŝminkadoj kaj edziĝadoj."

Mi bezonis tempon, mi ekternis iom post iom rekonu la ĉefajn tribojn, kiuj konsistigas la popolon de la vortoj. Ĉar la vortoj organizas sin en triboj, kiel la homoj. Kaj ĉiu tribo havas sian metion.

La unua profesio estas nomi objektojn. Ĉu vi jam vizitis plant-ĝardenon? Apud ĉiuj raraj plantoj oni pikmetis malgrandajn kartonojn, etiketojn. Tia estas la unua metio de la vortoj: deponi sur ĉiujn objektojn de la mondo etiketojn por rekonu. Estas la plej malfacila metio. Estas tiom multaj aĵoj, kaj komplikaj aĵoj, kaj senĉese ŝanĝiĝantaj aĵoj! Kaj tamen, por ĉiu el ili devas esti trovata etiketo. Vortoj ŝarĝitaj de tiu terura metio nomiĝas nomoj. La tribo de la nomoj estas la ĉefa, la plej multnombra. Estas nomoj kiuj etikedas por la aĵoj, kiujn oni vidas, kaj nomoj, kiuj etikedas por la aĵoj, kiuj

ekzistas, sed kiujn oni ne vidas, ekzemple la sentoj: kolero, amo, malĝojo. Vi komprenas kial la nomoj multnombros kiel puloj. La aliaj vortoj devas lukti por havi sian lokon.

La artikoloj estas servistoj, kiuj akompanas vortojn, nur kiam ili estas precizigitaj kaj konataj.

Vortoj, kun eventualaj artikoloj, promenas de mateno al vespero. Kaj de mateno al vespero, la plej ŝarata okupo estas trovi vestojn aŭ maskvestojn. Kredeble ili sentas sin tute nudaj, marŝante tiaj sur la stratoj. Eble ili malvarmas, ĉe sub la suno. Pro tio ili pasigas tempon en la magazenoj. La magazenoj estas prizorgataj de la tribo de la adjektivoj.

La vorto "domo" puŝas la pordon.

- Bonan tagon, mi trovas min iom simpla, mi volus ŝtofi min.

- Ni havas ĉion bezonatan sur niaj bretoj, - diras la magazinestro, - jam frotanta la manojn je ideo de bona afero. La vorto "domo" komencas siajn prov-vestadojn. Kiom da hezitoj! Kiel malfacilas decidi! Ĉu tiu adjektivo aŭ tiu-ĉi? Domo cerbumas. La elekteleco estas tiom vasta. "Blua" domo, "alta" domo, "fortikigita" domo, "alzaca" domo, "florhava" domo? La adjektivoj turniĝas ĉirkaŭ la kliento "domo" kun allogaj mienoj por fariĝi adoptitaj.

Post du horoj de tiu stranga danco, la domo elmagazeniĝis kun la vorto "Fantomlogata" kaj ĝi estis ravita de la aĉeto.

Ĉarmaj adjektivoj, nepraj helpantoj! Kiel ili estus grizaj, la nomoj, sen la donacoj, kiujn faras al ili la adjektivoj; la pipron, kiun ili alportas, la koloron, la detalojn... kaj tamen, kiel malbone traktataj ili estas!

Mi diros al vi sekreton: la adjektivoj posedas sentemajn animojn. Ili kredas ke la ligoj estos por ĉiam. Estas malbone koni la malfidelecon de la vortoj, kiuj ŝanĝas adjektivojn kvazaŭ ŝtrumpojn; apenaŭ provizataj, ili revenas al la magazeno por serĉi alian, sen iu ajn ĝeno. La malfeliĉa lasita adjektivo devas atendi alian amikon...

# Neelpensitaj historioj

Okazintaj siatempe al la redakcianoj de "K"

Kudrjavcev Viktor — redaktoro de "K"  
[Ekaterinburg, Rusio]

Jafasova Rafija — redakciano de "Komencanto"  
[Ekaterinburg, Rusio]

## Bone, ke li ne estis okulisto!

Foje ĉe mi ekmalsanis dento. La akra doloro trapikis la tutan korpon. Ŝajnis, ke doloras en la cerbo, kaj en la koro, kaj eĉ en la kalkanoj. Do, mi devis viziti dentiston. La dentisto faris al mi lokan anestezon kaj per terura maŝino longe boris la denton. Kaj poste diligente kaj same longe kuracis ĝin. Post fino de la laboro li etendis al mi la spegulon, ke mi povu vidi la rezulton. Kia estis mia miro, kiam mi konstatis, ke li kuracis ne la malsanan, sed la najbaran denton!

Al mia rimarko, ke ĉe mi doloris tute alia dento, li trankvile respondis, ke tiu ĉi ankaŭ postulis sanigon, kaj denton, kiu min maltrankviligis, li povos kuraci, se mi vizitos lin morgaŭ. Dum la nokto min denove turmentis la dentodoloro. Preskaŭ frenezita matene mi denove kuris al tiu dentisto. Kaj fine li kuracis la bezonatan denton.


Pri tiu historio mi rememoris, kiam aŭdis jenan anekdoton:

Dentisto al la paciento:

— Kara mia, mi devas konfesi, ke mi erare forigis al vi la sanan denton. Nun tamen necesas forigi la malsanan.

— Nu, kion fari, - respondis la paciento. - Bonas, ke vi ne estas okulisto!

Kaj mi ekpensis, en fundamento de ĉiu anekdoto kuŝas similaj historioj el reala vivo.



Smagin Maksim [Ekaterinburg, Rusio]

## La sekreta ŝoseo

Tiu historio okazis antaŭ dudek jaroj. Mi tiam servis armeon kiel leŭtenanto en milita regimento, kiu okupiĝis, pri la preparado de kosmaj ŝipoj por starto. Ĝuste nia regimento okupiĝis pri tiel nomataj "civilaj", ne militaj objektoj. Tiutempe inter Sovetunio kaj la aliaj landoj aperis modo sendi en kosmon internaciajn teamojn. Mi servis ĝuste en tiu periodo, kiam flugis en kosmon sovet-hungaria, -bulgaria, -mongolia, -vjetnamia... teamoj. Venis vico por francaj kaj fine usonaj astronautoj. Devis veni al nia kosma starto la prepara teamo el Usono, multaj gravaj personoj. Neniām antaŭe piedoj de la "eventualaj konraŭloj" paŝis sur la teritorio de tiu supersekreta milita objekto.

Por gardi la gravajn eksterlandanojn de ajnaj okazintaĵoj oni kaŝe dislokigis laŭ la ŝoseo, iranta al la kosma starto, sekretajn grupojn, konsistantajn el unu oficiro en civila vesto kaj du soldatoj. Mi estris unu el tiuj grupoj.

Jen mi kaj miaj soldatoj okupis nian lokon, pli-malpli kaŝis nin kaj atendis la fiksitan tempon de la preterveturo de la "aŭto-kavalkado". Kiam ĝis la indikita tempo restis 25 minutoj, subite el la stepo aperis malgranda buso, kiu laŭ la grunda vojo proksimiĝis al la ŝoseo. Mi tuj haltigis la buson kaj klarigis, ke plu veturi ne eblas. Estis brigado de konstruistoj, ili rapidis al manĝejo por tagmanĝi. Post miaj klarigoj ili komprenis, ke atendi necesas pli ol duonhoron kaj tiam ili certe malfruos... Brigadestro komencis petegi min lasi ilin plu veturi kaj mi, ho, ve!, permesis! La buso startis, supreniĝis al la ŝoseo kaj... ties motoro eksilentis. La ŝoforo provis funkciigi la motoron, sed vane, la buso ne deziris veturi!

Teruro senmovigis miajn krurojn. Ĝis alveno de la eksterlanda delegacio restis nur dek minutoj... kaj meze de la ŝoseo staras senmove fremda buso, kies aperon mi neniokaze devis permesi! Terure! Kion fari?

El mia gorĝo eksonis la kriego: "Puŝu, puŝu ĝin per manoj, diable, ..ble!" La brigado, mi kaj miaj soldatoj ekpuŝis la buson per niaj fortoj for de la ŝoseo. Ni sukcesis movi la buson je dudek metroj for de la ŝoserando kaj iom trankviliĝinte enspiris.

Apenaŭ ni sukcesis ekfumi por trankviliĝi, ekfulmetis la signallampoj de la eskortaj policistoj, kaj la grava eksterlanda delegacio "preterflugis" nin kaj malaperis. Multaj jaroj pasis, sed ĝis nun mi detale memoras tiun neelpensitan okazaĵon.

# Tempo kaj homoj

Trovis kaj tradukis  
**Havina Jelena** [Alapajevsk, Rusio]

## Homo de la kvara dimensio

Foje mi veturis en la loka trajno kaj meditis. Al mi proksimiĝis biletkontrolistoj kaj mi montris al ili mian biletan.

— Tiu bileto estas de hieraŭ, — diris la kontrolistoj. — Kio estas "hieraŭ"? - respondis mi. — Povas esti, ke tio, kio por vi estas hieraŭ, por mi estas hodiaŭ, kaj tio, kio estas "hieraŭ" por mi, por vi, ekzemple, signifas morgaŭ...

La kontrolistoj foriris, kaj mi daŭrigis mediti. Baldaŭ ili revenis. Kun ili estis policisto. Mi diris al li: — Se la tempo estas la kvara dimensio de la spaco, kial ne povas esti, ke vi moviĝas laŭ la akso de la tempo en unu direkton, kaj mi - en la alian? Aŭ, ekzemple, en la saman, sed kun diversaj rapidecoj?

La trajno haltis. La policisto prenis min je la brako kaj forigis el la vagono. La trajno foriris. En la plataĵo "X-Y" ĝi malproksimiĝis de mi, tamen ĝia projekcio al la akso "t", kiel antaŭe, samis kun la mia, moviĝante el la pasinto al la estonto. Kaj tiel estos ĉiam.

El la verkoj de V. Solouhin elrusigis  
**Patrakin Oleg** [Beloje, Rusio]

\*\*\*

Por ami kaj defendi la kulturon de la patrujo, sufiĉas, eble, naskiĝi en tiu ĉi lando, inter sia popolo kaj, tiel diri, ensuĉi la naciajn sentojn kun la patrina lakto.

Por ami kaj defendi kulturon de la alia popolo, via propra kulturo devas esti alta kaj vasta.

Por defendi kaj konservi sian kulturon, sufiĉas esti ruso, kartvelo, germano, italiano, hispano...

Por konservi kulturon de la alia popolo, necesas esti ne malpli ol Homo.



**Kornjuĥina Anna** [Barnaul, Rusio]

\*\*\*

Oni opinias, ke telegrafo, telefono, trajnoj, aŭtoj kaj aviadiloj ekzistas por ŝpari por la homo lian la plej valoran trezoron — la Tempon.

Sed evidentiĝis mirinda paradokso. Ĉu ni povas konfesi al ni mem, ke ni nun, uzantaj ĉiujn tiujn teknikaĵojn, havas pli multe da libera tempo ol la homoj de la antaŭtelegrafa, antaŭtelefona, antaŭaviadila epoko?

... Kiam oni pridiskutas la bonon, kiun alportis moderna civilizacio al la homaro, unue venas en la kapon tute neordinaraj rimedoj de moviĝo, oportunejoj de la trafiko. Ekzemple, oni opinias, ke la bona flanko de la urbo kompare al la vilaĝo estas tio, ke en ĝi oni povas uzi la oportunajn tramojn aŭ busojn, kaj en pli grandaj uboj eĉ metroon. Sed oni facile rimarkas, ke tiuj oportunaĵoj aperis en la vivo de la homoj nur kune kun la bezono uzi ilin: tramon oni bezonas ĉar malproksime situas la laborloko, kinejo, vendejo, bazararo. Ĉu en la vilaĝo oni bezonas la tramon? Se rigardi pli detale al la diversspecaj oportunaĵoj de la moderna vivo, oni povas rimarki, ke ĉiuj ili servas por kontentigo de neĉiamagrablaj bezonoj, tial ili ne havas rajton nomiĝi bonaĵoj. Fin-fine la penicelinon oni povas trakti kiel bonaĵo, sed por tio, ke ĝi estus traktata kiel bonaĵo, bezonatas, ho, ve!, malsano. Sed por la sana homo tio estas tute superflua aĵo.

Interalie, pri metroo. Ŝajne ĝi montriĝas bona inventaĵo de la homaro. Sed ja nur pro la akra bezono la homoj devas subteriĝi por tie moviĝi. Por la homo estas multe pli nature nerapide paŝi aŭ veturi tie, kie kreskas herbo, kie ŝvebas nuboj super la tero kaj brilas la suno.

Se vi volas, ke oni irus post vi — iru mem.

# AFORISMOJ

Trovis kaj esperantigis:

**Belousov Igorj** [Marks, Rusio]

Por pigrulo ĉiam aŭ pluvas, aŭ neĝas.

\*

Arbo estas forta per radikoj, sed homo per amikoj.

**Prokopjev Dmitriĵ** [Ĉaŝi, Rusio]

La proksima hundo plej verŝajne mordos.

\*

Preniton per manoj oni ne redonas per piedoj.

\*

Plej malfacile estas ne diri sekreton.

## Konsiloj

**Yves Bruso** [Douarnenez, Francio]


Sciu, gejunuloj, ke via estonteco estas antaŭ vi, tial ne rigardu malantaŭen por trovi ĝin.

**Zujeva Margarita**  
[Moskvo, Rusio]

Ne valoras tro zorgi pri tio, kion pensas pri vi la ĉirkaŭantoj. Paradoxo konsistas en tio, ke homojn, ne dependantajn de la opinioj de la aliuloj oni taksas pli alte.

J.Bis

Bildo de **Kirjœeva Olga** [Medveĵje, Rusio]



Kalkulante tion, kion ni bezonas por esti feliĉaj, ni forgesas aldoni nin mem.

L. Kumor

## Pri Novjaro, festoj kaj mirakloj

Kelkaj dekoj da Novaj jaroj faras homojn maljuna.

E. Krotkij

\*

Mi denove estas je unu jaro pli juna, ol mi estos en la sekvonta januaro!

J. Ipohorskaja

\*

Kristnasko — kiam la patro provas konvinki siajn infanojn, ke li estas Sankta Nikolao, kaj la edzinon — ke li ne estas Sankta Nikolao.

NN

\*

La agrablecon de printempo oni komprenas nur vintre, kaj, sidante ĉe la kameno, verkas la plej bonajn majajn kanzonojn.

H. Hajne

\*

Vintro estas tro malvarma sezono por fari tion, por kio somere estis tro varme.

NN

\*

Donacoj, samkiel la bonaj konsiloj, alportas ĝojon por ties donantoj.

E. Errio

\*

Mirakloj realigas tie, kie oni ilin kredas. Kaj ju pli oni kredas, des pli ofte ili realigas.

D. Didro

\*

Mirakloj foj-foje okazas, sed por ilia realigo bezonatas multa laboro.

H. Vejzman.

\*

Neniu kredas je miraklojn! Sed ĉiuj ilin atendas.

S.E.Lec

\*

Aŭskultante la tiktadon de horloĝo ni rimarkas, ke la tempo kuras antaŭ ni.

R.G. Serna



**Yves Brusso**  
[Douarnenez, Francio]

Foje Napoleono demandis al Nerono, kion li opinias pri Abrahamo Linkoln.  
"Kiu Linkoln? Mi ne konas", - respondis tiu malĝentilulo.  
Verŝajne li ne amis la usonanojn.

En la ekzameno:  
— Kiuj tri vortoj estas plejofte uzataj de la studentoj en ekzamen-periodo?  
— Mi ne scias.  
— Ho, jes, vi respondis ĝuste!

**Prokopjev Dmitrij** [Ĉasi, Rusio]

Anoncoj:

"Estas vendata hundo.  
Ĝi manĝas ĉion,  
tre amas infanojn..."

"Ni bezonas bebovartistinon.  
Aĝo - tri jaroj."

el la reta dissendo  
"Novosti Esperanto-dvijeniĵa"  
redaktas Slavik Ivanov [Rusio]

Venontjare la mondo celebros la 311-jariĝon de la granda germana fizikisto Fahrenheit, kio absolute egalas al la 155-jariĝo de Celsius.

Kolektis kaj esperantigis **Prohorov Sergej** [Kanaŝ, Rusio]

## El la vivo de bestoj kaj animaloj

**Azeno estas azeno**  
En vivo kaj sur la sceno...  
**Anatolij Radajev** [Samara, Rusio]

Parolas ĉevalo kaj la azeno.  
— Ni, ĉevaloj, estas la plej noblaj animaloj inter la homaj amikoj. Ni faciligas ties laboron, plibeligas vivon, ni bone taŭgas por milito...  
— Tio veras, - replikas azeno, - sed vin anstataŭas aŭtoj kaj maŝinoj, sed la azenoj ĉiam restos sur la sceno!

Foje iu urbano venis al vilaĝo. Vidas li, sur la kampo paŝtisto paŝtas bovinojn. Li demandas:  
— Ĉu vi ĉion scias pri viaj bovinoj?  
— Ĉion!  
— Bonvolu diri, ekzemple, kiomjara estas tiu ĉi bovino?  
— Dujara.  
— Sed kiel vi scias?  
— Nu, laŭ la kornoj...  
— Jes, certe, jen mi, malatenta, ne rimarkis, ke ĝi havas du kornojn...

Sidas en la restoracio leono kaj bovo. Subite al la leono telefonas la edzino per portebla telefono kaj ordonas tuj reveni hejmen. La leono ekstaras kaj planas foriri. Sed la bovo primokas la leonon, ke tiu timas sian edzinon ktp..., mi jen, la mian ne timas... ks.  
Sed la leono tiel respondas al la bovo:  
— Frato mia, vi, evidente, ne komprenas la situacion. Kio estas via edzino? Bovino. Sed la mia — leonino!

Kiel pruvis la sciencistoj de Harvarda Universitato, la musoj reproduktiĝas multe pli rapide, se al ili ne malhelpas la sciencistoj el Harvarda Universitato.

La opinio, ke la bovino donas al ni lakton kaj viandon estas erara.  
La unuan kaj la duan oni simple de ĝi forprenas.

Unu pulo estis tiom riĉa, ke posedis eĉ la propran hundon!

Unu pulo, rigardante al la ĉielo, filizofieme demandas la alian:  
— Interese, ĉu ekzistas vivo sur aliaj hundoj?




Bill Thorne [Londono, Britio]

MIA TUTA LUDANTARO ESKAPIS.

# Nova jaro, Kristnasko, gaja ripozo, senzorgaj ferioj, vintro kaj neĝo...

Ĉion tion vi trovos en nia enigmo.

En la litera haoso estas kaŝitaj vortoj, rilataj ĝuste al la supraj temoj.

v	i	n	t	r	o	a	b	i	o	n							
f	e	r	i	o	s	k	i	o	j	o							
k	o								v	v							
r	k								o	a							
i	s								j	j							
s	a								a	a							
t	n								ĝ	r							
n	e								o	o							
o	ĝ								t	g							
r	o								u	n							
i	z								r	o							
p	o								i	m							
f	e								s	t	e	n	o	o	m	s	o

RIMARO



Bill Thorne

ENO

anteno  
areno  
arlekeno  
aveno  
azeno  
baleno  
baseno  
beno  
bieno  
bulteno  
ĉagreno  
ĉeno  
delfeno  
domeno  
ebeno  
fadeno  
fenomeno  
festeno  
gangreno  
geno  
greno  
ĝeno  
haveno  
hieno  
indigeno  
ingveno  
kameni  
kateno  
kreteno  
kurteno  
kuseno  
magazeno  
mandareno  
manekeno  
margeno  
mateno  
mieno  
orgeno  
peno  
refreno  
reno  
rubeno  
sceno  
sireno  
sukceno  
tereno  
veneno  
veno



Korektaj respondoj al la  
kvizo el "Komencanto" -5  
pri Ludoviko Lazaro  
Zamenhof

1-15.12.1859; 2-Rusia Imperio; 3-Marko; 4-  
Okulisto; 5-La internacian lingvon; 6-Netuŝebla  
"Fundamento"; 7-"La Unua Libro"; 8-La Espero;  
9-La Espero; 10-La Esperantisto; 11-Universala  
Esperanto-Asocio; 12-iniciatoro.

Saluton, Viktor!

Mi ricevis la n-ron 5,- dankon!- kaj iomete  
reagas... Unue: mi havas peton: en kelkaj  
numeroj vi aperigis la rimaron de Bill  
Thorne. Mi ne tranĉas la revuon, sed dezirus  
havi lian plenan rimaron. Ja foj-foje necesas  
esperantigi iun kanteton aŭ versaĵon kaj ne  
ĉiam tuj venas el la memoro necesa  
vorteto...

**Aleks. Masiukas** [Murmansko, Rusio]

Karaj legantoj, kiel vi rilatas al tiu  
propono? Ni povas eldoni la Rimaron,  
se venos sufiĉa kvanto da mendoj.

# Invitoj kaj informoj

## Pri Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia

Ĉina Radio Internacia (ĈRI, antaŭe Radio Pekino) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po duonhoru respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio, kun novaĵoj, raporto aŭ komento pri gravaj eventoj kaj kun jenaj programeroj: Leterkesto, Vojaĝo en Ĉinio, Ĉina Kulturo, Ekonomia Panoramo, Socia Vivo, Esperanto en Marŝo, Dimanĉo, Muzika Programero, k.t.p.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.

Korespondada Adreso: Ĉina Radio Internacia Poŝt-kesto 4216 CRI-36

Poŝt-kodo: 100040

Telefono: 86-10-68891940 Fakso: 86-10-68891941

Retpoŝto: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

### Horaro

Regionoj	UTC	Ondoj(m)	Khz
Japanio, Koreio	11:00 -----	41,84 25,16	7170 11925
	11:30		
Sudorienta Azio	13:00 -----	25,75 19,72	11650 15210
	13:30		
Eŭropo	20:00 -----	25,58 30,11	11730, 9965
	20:30	25,40	11810
Latin-Ameriko	22:30 -----	30,43 25,64	9860 11700
	23:00		

### Programo

Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
Signalo Novaĵoj						
Raporto pri Kurantaj Aferoj					Esperanto en Marŝo	Dimanĉo
Leterkesto	Vojaĝo en Ĉinio	Ĉina Kulturo	Ekonomia Panoramo	Socia Vivo	Anonco de Ondoj	Anonco de Ondoj
Epilogo						
Finiĝo (La Totala Longo de Programeroj 26'30"—27'00")						

### Kelkaj utilaj TTT — paĝoj

Universala Esperanto-Asocio	<a href="http://www.uea.org">http://www.uea.org</a>
Rusia Esperanto-Unio	<a href="http://www.reu.newmail.ru">http://www.reu.newmail.ru</a>
Servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto	<a href="http://www.edukado.net">http://www.edukado.net</a>
Esperanto Servocentro kaj E-elektronika-librejo	<a href="http://www.esperanta.eu">http://www.esperanta.eu</a>

## Skribu al Avo Frostoj! Li respondos al vi ankaŭ en Esperanto!

Se viaj infanoj deziras skribi al Avo Frostoj, ili povas tion fari en Esperanto. Kristnasko kaj Novjara Festo alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frostoj. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la Norda Poluso. Ekde 2002 la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frostoj ricevos respondon en Esperanto. En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo, kiu jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002 Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frostoj. La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junaĵojn, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frostoj. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

AVO FROSTO  
NORDA POLUSO  
HOH OHO  
KANADO - CANADA

Avo Frostoj preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je [avofrostoj@yahoo.ca](mailto:avofrostoj@yahoo.ca)

Normand Fleury

Prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia  
6358, rue de Bordeaux,

Montrealo,

Kebekio,

Kanado, H2G 2R8

P.S. Estas la unua Kristnasko kiam Avo Frostoj uzos Esperanton kaj ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondajhoj. Ekzemple, li povus konfuzi lingvojn aŭ perdi leterojn.

Se bedaŭrinde tio okazus al vi, sendu retmesaĝon al [avofrostoj@yahoo.ca](mailto:avofrostoj@yahoo.ca) kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn.

Ho! Ho! Ho!

## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

39 ja., fraŭlo, komencanto,  
instruisto de historio.  
Int: historio, militaj kaj  
politikaj aferoj,  
spiriteco...sciencoj.

*Claudio Marcelo SILVA*  
Rua Senador Nabuco, 143,  
apto. 404, Vila Isabel  
Rio de Janeiro, RJ,  
20551-230,

**Brazilo**

cmas@superig.com.br

56 ja. bestkuracisto.  
Intereso: medicino,  
naturhistorio, lingvoj,  
literaturo, legado kaj  
fremdaj landoj kaj popoloj.  
Mi pref. kor. papere kun  
viroj 40-65 jaraĵ en orienta  
Europo, Azio aŭ Suda  
Ameriko.

s-ro *Sigurdur H.*

*Petursson*

Merkjalaek  
541 Blönduós

**Islando**

sighp@isl.is

66 ja, komencanto. Int:  
homa komunikado,  
vojaĝado, fiziko, politiko

s-ro *Michel Arlès*

8 Rue des Lapins  
F-01600

Trévoux

**Francio**

michel.arles@freesbee.fr

Mi estas 30 jara maristo  
por amerika maro-ameo.  
Intereso: gitaro, filmoj,  
esperantaj amikoj.

s-ro *Vang, Yea*

Kalifornio - Yokosuka,

**Usono - Japanio**

mustsev1000@hotmail.com



Kirjeeva Olga, [Medveĵje, Rusio]

13 jara komencanto. Int:  
lingvoj, rajdi biciklojn,  
vojaĝado, la reto, muziko.  
kor. kun gejunuloj.

*Luke Williamson*

15 Barcheston Road  
Cheadle, Cheshire  
SK8 1LJ,

**Britio**

21 jara, komencanto. Int:  
teatro, muziko, legi,  
lingvoj, historio. Mi  
preferas paper-poŝton.

s-ro *Erik Winsor*

625 W. 27th Ave.

Kennewick,  
WA 99337

**Usono**

Vampyre625@aol.com

Mi estas 45 jara, federacia  
publika funkciisto, natur-  
amanto. Int: poŝtkartoj,  
poŝtmarkoj, Ne-Identigita  
Fluganta Objekto kaj  
sincera amikeco. Mi dez.  
kor. kun gesamideanoj,  
inter 25 kaj 50 jaraĝaj.

s-ro *Jorge Luiz Candido*  
*do Amaral*

Avenida Candido Rondon,  
992, Bairro Serraria,  
CEP: 97958-000

Guajará Mirim (RO)

**Brazilo**

j1ca @ gm-net.com.br

Int: fotoj, ĵurnaloj, lingvoj,  
bildkartoj, komputiloj,  
legado, vojaĝoj. Mi dez.  
kor. tutmonde, aĝo ne  
gravas, preferas paper-  
poŝton.

*Navin Lal Shrestha*

G. P. O. Box 11753

Kathmandu

**Nepal**

navinlrs@hotmail.com

# KOMENCANTO 2003

16 paĝoj  
kolora kovrilo

famaj esperantistoj  
historio de E-literaturo  
gramatiko serioze kaj ŝerce  
neelpensitaj historioj  
amuzaj rakontoj  
proverboj, enigmoj  
aforismoj, anekdotoj  
anoncetoj, adresoj  
multaj multaj bildoj

Bonvolu noti novan retroŝtan adreson de KOMENCANTO

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj !

